

Heinrich Heine,  
Milde fluas tra la kor'

*tradukita de Valentin Melnikov*

Milde fluas tra la kor'  
kanto primavera.  
Flugu, melodi-sonor',  
en la vast' aera.

Flugu longe, sen ripoz',  
super domoj flutu.  
Se troviĝos tie roz' –  
ĝin de mi salutu.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.*

*Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov> . Vidu: <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html> . Vidu ankaŭ: <http://www.esperanto.mv.ru/Melnikov/index.html> .*